

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**124**  
printempo 2021



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

## federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

## nia federacio sur Facebook

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

## prezidanto

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

## aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Nicole Lafitte  
(ĉe la supra adreso de  
Pierre Oliva)

## sekretario

## redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

## limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° 25-a de junio 2021

bonvolu sendi al la supra retadreso


><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

## Vorto de la Prezidanto

Ekde unu jaro, la viruso ne nur iĝis preskaŭ nura diskuttemo, sed plie ĝi triste kaj kruele punas/afektas multe da personoj tutmonde. Mi esperas, ke vi fartas bone! Ne forgesu serioze protekti vin uzante maskojn, ĝelon kaj respektante taŭgan interpersonan distancon. Bedaŭrinde, ankaŭ en nia federacio, nenio plu funkcias normale... Mi supozas, ke ĉiu el vi pli malpli sukcesas organizi aŭ partopreni klubajn kursojn aŭ konversaciojn, ĉu per telefonajn ĉu per komputilajn. Dankegon pro via sindediĉo por tiuj aktivecoj, kaj bonan laboron! Mi estus ege ĝoja povi paroli, en nia julia gazeto, pri la epidemia fino!

*Pierre Oliva*



## enhavo

2	el la regionaj asocioj	12	ZEO-oj en PACA agendo
4	federacioj esprimas sin... skribe	+	retaj suplementoj - pri MES-2020 "El la taglibro de Paŭla"
8	Provencaoj esprimas sin... pentre aŭ fote		- pri Reunio
11	paĝo de la komencantoj		- pri la 10-jara datreveno de la katastrofo de 2011 en Fukuŝima

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon por la jaro 2021 - 6 € - al Espéranto-Provence

ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Nicole Lafitte

Dankon!

## El la regionaj asocioj



### 05 - Esperanto-Gap

*n.d.l.r.: En la numero 123-vintro 2020/2021, estis artikolo pri reta Esperanto-Festo organizita de Espéranto-France. Jen la kontribuo de membro de nia federacio al tiu virtuala festo:*

#### Monique Arnaud

Jen bela rakonto:

Expolangues 2015, Porte de Versailles, Espéranto-France havis budon por informi pri Esperanto kaj mi tre ŝatis deĵori tie.

lun posttagmezon, Greta Franclét rondiris la mult-nombrajn budojn por inviti homojn aŭskulti ŝian prelegon, kies temo rilatis al instruado de fremdaj lingvoj. Ŝi tuj kaptis mian atenton kaj mi ĉeestis.

Ŝi verkis libron: «*Nul en langues - Plus jamais*». Mi ĝin aĉetis kaj ekrlatis rete kun Greta. Kompreneble mi insistis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, tio ege plaĉis al ŝi.

Du jarojn poste, ŝi decidis reverki la libron kaj dediĉi unu ĉapitron al Esperanto. En septembro 2019 aperis nova libro sub la titolo: «*Les langues, un jeu d'enfant*». (*Guide pratique pour s'éveiller aux langues dès le plus jeune âge*).

La unua parto prezentas la mekanismon de lernado de lingvoj, la dua parto klarigas kiel konkrete, en via ĉiutaga vivo, vi povas doni al via infano la emon paroli fremdajn lingvojn. En la unuaj paĝoj ŝi klarigas pri la bridoj por multaj francoj paroli aliajn lingvojn. Ŝi bone prezentas, kiel ni lernis paroli nian gepatran lingvon kaj de tiu analizo, ŝi proponas metodon por instrui alian lingvon.

Gi nomiĝas *E.S.P.O.I.R.*

*Ecouter*: aŭskultu, aŭskultu kaj nur poste lernu.

*Souvent*: ofte, ĉiutage.

*Avec Plaisir et Patience*: sentu ke vi plenumas ion kaj ju pli vi progresas des pli vi ĝojas, tamen vi bezonas tempon.

*Oser*: ne timu paroli, kaptu ĉiun okazon, ni lernas per niaj eraroj.

*En Immersion*: neniam uzu tradukon, provu diveni laŭ la kunteksto, via menso estos agema.

*Répéter*: ripetu, ripetu kaj lernu malrapide, ĉefe je la komenco, frekvenco gravas.

En la dua parto, multe da praktikaj kaj konkretaj konsiloj, adresoj por aŭdigi la lingvon: ili rilatas al la diversaj aĝoj de la infano... en lulilo, en infanĝardeno, en baza lernejo en meza lernejo kaj por homoj kiuj rilatas al instruado!



TTT-ejo  
[leslanguesautrement](http://leslanguesautrement.com)  
tel de Greta  
06 28 81 30 66

libro aĉetebla  
ĉe la verkisto

#### Prelego de Monika

Malgraŭ la pandemio, prelego de Monique Arnaud okazis la 15an de oktobro en la "Maison de l'international" de Grenoble. Venis malmulte da homoj: ni estis nur 9. La prelego estis interesa kaj eblis aĉeti la libron, kiun Monika prezentis.

*raportis Ewa Grochowska*



**Saint-Bonnet-en-Champsaur - Hautes-Alpes**  
**une pétition pour encourager l'enseignement de l'espéranto**

Monique Arnaud a commémoré en visioconférence avec les espérantistes du monde entier le 161<sup>ème</sup> anniversaire de Louis-Lazare Zamenhof, père de l'espéranto, né le 15 décembre 1859.

Rencontre avec celle qui n'a de cesse de militer pour l'enseignement de cette langue universelle.

**Extraits des propos recueillis par Marie-Anne Bourgeois (Le Dauphiné libéré).**

" Monique Arnaud milite pour l'enseignement de l'espéranto. Elle espère que la pétition lancée par les "espérantistes" convaincra les parlementaires français du bien-fondé de l'apprentissage de cette langue universelle pour une meilleure communication entre les peuples. "

**Quelle est donc la décision prise lors de la fête de Zamenhof, le 15 décembre 2020 ?**

" Une pétition vient d'être lancée pour encourager l'enseignement de la langue internationale espéranto à l'attention des parlementaires français. Car il y a cent ans, la proposition de généraliser l'enseignement de l'espéranto dans le monde en plus de la langue maternelle avait été faite lors de la première assemblée générale de la Société des Nations, à Genève, pour éliminer les problèmes de communication entre les peuples. En décembre 2020, les difficultés de communication sont toujours les mêmes. La langue internationale espéranto, facile et égalitaire, pourrait permettre une meilleure compréhension entre tous. "

[La pétition est en ligne ici.](#)



**13 - Espéranto-La Ciotat**

**Amikaj konversacioj anstataŭ veraj kursoj**

En La Ciotat, daŭre estas fermita la kvartala domo, kie ni kutime kursas.

Sekve, en mia propra domo kunvenas tri "lernantoj", Marc, Christine kaj Alain.

Ni kune festis la reĝojn, daŭre kunmanĝetis aŭ trinkis sed samtempe diskutis pri la propono de UEA planti arbojn, pri Sergeji Possad, monaĥejo apud Moskvo kaj pri la homaj bezonoj, komparante la vivon dum la Blokado en Leningrado kaj la naziaj koncentroj kun la nunaj krizaj vivkondiĉoj.

En Marsejlo, same, ni akceptis la proponon de Chantal troviĝi en ŝia domo: venis Marie-Hélène kaj Marko. Bela okazo konatiĝi kun la desegnofilmeto, kiun Chantal preparas, interŝanĝi kun Marie-Hélène, kiu ekspozicias en la hotelo Ibis - La Joliette (bedaŭrinde, ĉar la restoracio estas fermita, ne estas multe da vizitantoj). En ambaŭ urboj, mi konstatis la plezuron de la homoj troviĝi, kunesti, paroli en Esperanto. Kiel ni konstatis, por vivi, homo havas bazajn bezonojn (manĝi, trinki) sed li bezonas ankaŭ socian vivon kaj kontaktojn. Kaj esperantistoj tion tre ŝatas.

*raportis Renée Triolle*



**13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille**

**article paru dans la Lettre d'information**  
**Espéranto-Aktiv' n° 121 – mars 2021 -**  
**rubrique « Ils l'ont fait... dans leur région »**

Réunion virtuelle à Marseille.

Parmi les groupes espérantistes organisateurs de réunions virtuelles, Marseille nous convie deux fois par mois.

Un groupe de plusieurs nations: Allemagne, Grande-Bretagne et France, s'est réuni le jeudi 4 mars à partir

de 18 heures par Zoom.

Une discussion animée sur des sujets d'actualité, telles la COVID, la voiture électrique et la production d'électricité... et bien d'autres encore.

Tout cela dans une ambiance bien agréable et bien reconfortante à l'heure actuelle.

*(Info Espéranto-Aktiv' et Thierry Spanjaard)*

Prochains rendez-vous: 15 et 29 avril...

*(voir infos sur [esperanto.marseille.over-blog.com](http://esperanto.marseille.over-blog.com))*



## 83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël

La ĝenerala membro-kunveno okazis la 27an de januaro ĉe Denise Loisel. 6 membroj partoprenis. El la preparolitaj temoj, estis i.a. la ĉijara nuligo de la Mediteranea Esperanto-Semajno kaj la kursoj, kiuj okazas ĉe Denise, ĝis rea malfermo de la Domo de asocioj, je strato de La Soleillette.



### Federacioj esprimas sin... skribe...

**Pluraj tekstoj de membroj de nia federacio estis publikigitaj en konataj Esperanto-revuoj.**



n° 123  
marto 2021

En sia numero de marto 2021, "**Monato**", la konata "internacia magazino sendependa", aperigis tekston de **Marc Gallardo** (Marseille): "Rimarkoj pri la indirekto de la universo".

En la sekva de aprilo estis publikigita teksto de **Thierry Spanjaard** (Marseille): "Ĉu vi suferas pro Zoom-laceco?".

Samteme estis jam artikolo de Thierry en la numero 123 de "**Espéranto-Provence**": "Ĉiuj enskatoligitaj! Ĉu retkolibroj efike luktas kontraŭ Zumlaceco?".

Nu... la temo interesis alian redaktoron, ĉar la sama teksto estis ree publikigita en la n° 606/607 de "**Le Monde de l'espéranto**", kiun vi jam ricevis de via klubo aŭ baldaŭ ricevos.

**José Grammatico** (Manosque) ĉiunumere kontribuas al la enhavo de "**Espéranto-info**" per sia rubriko "Humour - Humuraĵoj". En la marta-aprila numero 147 aperis alia teksto de José: "Parlez-vous globish"?

Ankaŭ **Jean-François Cousineau** (Lorgues) aldoniĝis al la teamo de kontribuantoj per nova rubriko, "Iam estis...", en kiu regule aperos tradicia orienta fabelo, kiun li esperantigis el la franca.

Jean-François ankaŭ zorgas pri la korektado de la revuo.




n° 147  
marto-aprilo 2021



n° 132  
okt-nov-dec 2009

**Charles Carrey** (Hyères), sub sia plumnomo **Ŝarlerik d'Arroy**, kutimas sendi tekstojn siajn al LKK, "**La Kancerkliniko**", "kultura, politika, skandalema, ajnista gazeto".



n° 303  
februaro 2020

**Renée Triolle** (La Ciotat) regule partoprenas en la redaktado de "**Literatura Foiro**" per artikoloj, ofte i.a. pri kino.

En la aprila numero 310 aperis artikolo ŝia pri plurlingva antologio el Afriko.

*n.d.l.r. : Mi eble forgesis aliajn artikolojn, de aliaj aŭtoroj, en aliaj revuoj... sed mi povas sciigi nur tion, pri kio mi mem eksciis. Do, ne forgesu sendi informon pri publikigo de teksto(j) via(j).*

## **kontribuo de federaciano al verkado de nova libro**



Ĝus estis eldonita de FEL (Flandra Esperanto-Ligo) nova verko iniciatita kaj kompilita de Petro Desmet': "Oklingva Proverbaro".

Post la "Trilingva Kompara Frazologio" de Marko Zamenhof (patro de Ludoviko) kaj la "Esperanta Proverbaro" de Ludoviko Zamenhof, realiĝis "la revo de ambaŭ Zamenhofoj, ke iam aperu harmonia kunigo de la verkoj de la patro kaj la filo." (*laŭ teksto sur la dorsa kovertpaĝo*).

**Pascal Vilain** (Hyères) zorgis pri la franca parto.

### **Federacianoj skribas... por sia nura plezuro...**

*Pro la nuna pandemio, malpliĝis la okazoj renkontiĝi, ĉeesti kursojn, staĝojn, kongresojn... Multas tamen retaj eventoj, sed ili ne havigas la saman plezuron kiel realaj.*

*Espereble vi plu uzas nian lingvon alie, ekz. aŭskultante kanzonojn aŭ radio-elsendojn, spektante filmojn aŭ videobendojn, legante revuojn aŭ librojn... Kelkaj emas eĉ uzi skribe la lingvon.*

*Jen tekstoj de federacianoj, kiuj kutimas verki.*

### **OkMinutoj**

De pli ol unu jaro, Nicole Lafitte kaj Pascal Vilain partoprenas en verkateliero, "OkMinutoj", iniciatita de Anna Löwenstein okaze de staĝo en Greziljono. Ĉiusemajne, la partoprenantoj ricevas temon, pri kiu ili skribu komence dum ok minutoj. Poste, ili rajtas igi sian tekston pli longa, bonstila, interesa...

Jen du el iliaj skribaĵoj, pri la temo: "**D-ro Zamenhof vizitas Greziljonon - en la jaro 2020!**"

#### **Nicole Lafitte (Espéranto-Le Beausset)**

Post mia aŭtuna staĝo en Greziljono, plurfoje stranga sonĝo invadis mian dormadon. Kial? Sendube ĉar ofte, surloke, mi pensis pri Zamenhof, legante titolojn pri lia biografio en la biblioteko.

La unuan fojon, li konfidis siajn tujajn impresojn, alveninte en Francion, almenaŭ unu jarcenton post la kongreso de Bulonjo. Mi nur aŭskultis lin:

"Kia bela kastelo, kia bela parko! Mi miras, ke ordinaraĵoj, Esperantaj asocioj, ne riĉaj, povas ĝui tian mirindaĵon!



Certe ili multe laboras tie, sen salajro, por beligi, konservi ĝin! Mi estas tre feliĉa pro tio. Gratulon miaj karaj esperantistoj!

Mi rimarkas, proksime, ke la kamparo ne estas malriĉa kiel en mia lando. Nun en Francio, viroj kaj virinoj vestiĝas same per pantalonoj. Ĉu roboj ne plu ekzistas?

Antaŭe mi malkovris, ke multaj francoj ne estas tre religiemaj. Ĉu estas pro tio, ke preĝturoj ĉi tie kliniĝas? Eble estas ŝerco kontraŭ kutimoj de la Eklezio?

Vere, vi estas tre liberaj en via lando. Bone. Bedaŭrinde, mi ne povas ĉie fumi. Vi pravas sendube. Mi ne scias, ke fumado estas tiel danĝera por la sano. Tamen... malfacilas labori, ĉefe skribi aŭ legi, sen tio."

Alian fojon, mi spertis inkubsonĝon.

Zamenhof petis esplori la bibliotekon. Mi ekpensis pri diversaj revuoj, kiel la franca «Le Monde de l'espéranto», en kiu oni informis pri la morto de lia nepo, nekonata de li; pri libroj kiel «La Zamenhof-strato»,

«Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto». Jam la unua mondmilito estis afliktego por li. Mi volis malebligi al li terurajn malkovrojn: la duan mondmiliton, la tragikan sorton de liaj infanoj, la persekutadojn de esperantistoj en Sovetunio, en Germanio, pro stalinismo kaj naziismo.

Sen paroli pri multaj aliaj militoj en la mondo ĝis nun! Sed li petegis, eĉ postulis iri en la bibliotekon. La tutan nokton mi inventis kialojn por prokrasti tion. Mi ne scias, ĉu mi sukcesis, sed mi vekigis lacega!

Feliĉe, iam mi revis pri lia vizito kiel mirinda okazaĵo. Li estis ridetema, eĉ ĝoja. Li ludis kun Esperantaj infanoj kaj adoleskantoj. Li miris pri ilia flua parolado, iliaj eltrovoj. Li mem ne zorgis pri infana edukado en Esperanto. Li dankegis samideanojn, kiuj zorgis pri ili.

### ***Pascal Vilain (Espéranto-Hyères)***

17a de aprilo 2020.

Komenciĝas studperiodo PRINTEMPaS en la Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Greziljono.

Neatendite aliĝis L.L. Zamenhof.

Jes ja, vi bone legis: la kara iniciatinto de nia lingvo!

Je sia alveno, antaŭ ol eniri la kastelon, li renkontiĝas kun junulo en la parko.

- Saluton, kara samideano, kiu vi estas?

- Marko, el Germanio, kaj vi?

- Mi estas Ludoviko. Ludoviko Zamenhof. Iam mi vivis en Pollando. Sed vi konas min, ĉu ne?

- Nu... ne... ŝajnas al mi... ke ne... Ĉu vi membras en Amikumu?

- Amikumu? Mi neniam aŭdis pri tio!

- Ĉu vere? Nekredeble! Sed vi certe havas kontojn ĉe Fejsbuk', Tviter', aŭ Instagram', Telegram'...? Mojosaj\* amaskomunikiloj! Ili furoras nuntempe ĉe la Espistoj! Vi certe kreis viajn paĝojn... sed mi ne memoras pri via avataro! Ĝin mi vidis nek sur mia aptelefono nek sur mia tabulkomputilo!

Li fervore partoprenis en atelieroj pri skribado, kantado, kiel entuziasma homo.

Li estis kontentega, vidante niajn nunajn kursgrupojn kun francoj, hispanoj, usonanoj, angloj, turkoj...

Rigardante fotojn, li malkovris, ke tutmondaj esperantistoj staĝis en Greziljono.

Mirakla por li estis la komputilo. Li malkovris Esperantajn retejojn kun iliaj mirindaj eblecoj. Li parolis rete kun pluraj samideanoj. Li feliĉiĝis pri niaj UKoj, staĝoj, renkontiĝoj en la mondo.

«Esperanto vivas, progresas, kiel mi deziris», li ofte ripetis. Ankaŭ ni estis feliĉaj.

Kia bela songo!

- Pri kio vi parolas, diable? Mi nenion komprenas! Ĉu vere vi ne konas min? De kiom da tempo vi estas en nia movado? En kiu klubo vi aktivas? Kiu estis via kursgvidanto?

MOVADO



- Movado? Klubo? Kursgvidanto? Ankaŭ mi nenion komprenas el via ĵargono! Mi konas nur mian lernmetodon Duolingo. Tre bona apo, cetere, vi ja konas ĝin, ĉu?

- Apo\*... apo... mi eĉ ne konas la vorton!

(aŭdiĝas muzika telefonsonado)

- Oh... pardonu, Ludoviko... iu vokas min per Ŭacap', mi devas lasi vin... ni certe revidos unu la alian ĉinokte en la gufujo\*, ĉu ne? Ĝis...

Kaj la kompatinda Ludoviko, provante trovi en sia konfuzita memoro la figuran signifon de la ĵus aŭdita «gufujo», paŝas plu al la kastelo, iel timante pri la sekvo kaj dirante plian fojon al si mem:

«Ho mia kor', ne batu maltrankvile!».



\* : la vortoj "mojosa", "apo" kaj "gufujo" ne estas en PIV, sed ili troveblas en PReVo kaj Reta Vortaro.

## Lumon

Lumon ĉe kvina etaĝo, kriis la vokto, dum la nokto, sur bombardata Parizo. Kiam mia granda fratino malsupren tiris min por kurfali al la kelo, tiam mi vidis zigzagantajn lumojn sur la katedralvitroj de la ŝtuparŝakto. Timo, tiom de miaj fratinoj, de miaj gepatroj, de la najbaroj, tiom mia nin vipis galopen. Lumo kaj timo. Ne pro mallumo. Pro la movantaj lumoj.

Mia edzino tion ne konis. Ŝi bezonas vitrojn, lampojn, luksojn superabunde. Tamen, nenio plej kvietigas ol biblioteko je duonombro. Tie ni havas du fenestrojn, unu lukon tra muro kaj alia tra tegmento por premeĝi sunon sur la skribotablo. Fuŝa por la komputilo. "Ne problemo, diris mia ĉefino, mi aĉetos mallumigan rulkurtenon. Do, mi, sur fia malalta nestabila skabelo, ŝraŭbis sur la vazistaso kontraŭsunajon, kiu obeas je teleregilo kaj elektre funkcias ja de suno mem. Mi volas, ne plu.

Dum nokto, lumo ĉiam estas danĝero. Dum milito oni ekscias ne bruligi sinsekve du cigaredojn per sama alumeto; aŭ la dua ulo lulos kuglon en sia nazo.

Milito malbonas por la neŭronoj. Sed dank' al Dio, Sirio, Irako kaj ĉio ĉi ĉe apuda Oriento malproksimas, sed merdo al Dio, la malfeliĉaj geknaboj...

Fuĝu el la urboj. Feliĉo estas sur la kamparo. Vi promenas tra la arbaroj, laŭlonge de la etaj vojoj.

Mi foriris por eta promenado, ĉivespere. Mi gapvadis borde de roĝo. Noktis, abrupte, pro la nuboj kiuj fermas la ĉielon. Mi marŝis sen ion vidi ekstere, sen aŭdi bruon, miaj manoj en miaj truitaj poŝoj.

Mi estis lulata de la zumado de mia implikita spirito. Mi vagis. Mi ne diras al vi je kia stato. Inter Arturo Rimbo, Viktoro Hugo kaj Almanak' Vermoto. Mi ne havas la vortojn por tion diri.


Mi vidis el malproksime plenreflektoran veturilon. Ĝi ne rapidis. Strigo lante pasis antaŭ miaj okuloj. Tiam ĉio ŝvebis. Molaĵo de la aero; ia kina truko. Kiam ĝi alproksimiĝis, mi distingis lumon en la stirejo. Virino ĉe la direktilo. Tio rulis paŝe.

Nur per la lampoj "kat-okuloj", oni iris je lunlumo, kiam ĝi ne kaŝiĝis malantaŭ la nuboj. Nia ĉefserĝento decidis, ke ni nokte patrolos en "halftrack" (usona kirasita veturilo) por ĉasi "feluzojn" (ribelantaj felaoj). Ne facilas bremsi suboficiron, kiu freneze drinkadas. Ankoraŭ nun tiu fiaĉulo naŭzas al mi.

Ne pensi pri tio. Jen, mi vomas serĝent-restaĵon, kiun mi havas sur la stomako.

La ulino ĉe la stirilo... ŝajnas, ke ŝi estas kina aktorino. Sed, ja, estas avino de Monako. Jes, grasa Grace de Monako; ŝi ne bonfartas, tute flanke de sia telero. Ĝia veturilo ŝanceliĝas. Mi flanken iras sur la herbejo. La reflektiloj lumigas mian tutan korpon. Mi estas transvidebla. Ŝi devojiĝas, rekte sur mi. Mi ne sentis ŝokon. Mi traglitis. Du ektoplasmoj. Mi vidas ŝin, kiu foriras, sur la herbejo. Eble ŝi serĉas feliĉon. Estas nur fumo, kamaradino. Vi nur fumo estas.

Mi reiras hejmen. Pli facilas. Miaj okuloj lumigas la vojjon. Mi eĉ tuj trovis la truon de la seruro. Mia edzino estis en la biblioteko. Kiam ŝi vidis min, ŝi ekstaris. Ŝi diris: "Vi havas belajn okulojn, sciu." Kaj ŝi planken svenis.



Ĉiuj aliaj virinoj en la oficejo komencis procesojn kontraŭ vi pro seksa persekutado. Ĉar vi ne persekutis min, mia advokato rekomendis, ke mi procesu kontraŭ vi pro diskriminacio.

*temo tute aktuala, ĉu ne ?*

## **Fra Gaeta (Peypin)**

*Francesco Gaeta afable permesis aperigon de poemoj siaj en nia gazeto. Jen tri el ili. Temas pri 48-silabaj poemetoj, kies formo devenas de la japana poezio. Ilia strukturo jenas : 5-7-5-7-7-5-7-5*

### **Preludo**

sur luna pado  
jen karulino mia...  
naturzumado.  
ho! ŝia voĉo rave  
kantetas aergrave...  
tanĝas kiseto  
parfumodoro ŝia  
sorĉa koketo.

### **Vivu Vivaldi**

ama estado  
en la ĉambra muziko,  
ĝu-dorlotado  
lumpapilia svarme  
daŭre surprize ĉarme  
ĉion malfaldi  
sub aermozaiko  
de vi, Vivaldi.

### **Ripozante**

je la vespero  
sur la glataĵo ŝtona,  
dum la cetero  
enpense ne plu ŝtormas,  
ripozante ekdormas  
nia heroo  
ĉe l' praa monotona  
fontansoloo...

*Se ankaŭ vi estas skribema... se vi verkas poemojn, novelojn, eseojn, romanojn...  
ne hezitu sendi ilin al la redaktoro (ret- kaj poŝt-adresoj en la kolofono unuapaĝe)*



### **Provencanoj esprimas sin... pentre aŭ fote...**

*Pluraj membroj aŭ apogantoj de nia federacio havas artan talenton. Ili estis petitaj prezenti sin kaj siajn verkojn.  
Kelkaj jese respondis. Jen ili, laŭalfabete ordigitaj... Sekvo en la venontaj gazetnumeroj...  
Se ankaŭ vi havas arttalenton kaj ŝatus konigi ĝin, ne hezitu kontakti la redaktoron (kontaktingformoj unuapaĝe).*

## **Chantal Beaumont (Espéranto-Marseille)**


Plasticienne, je navigue avec un grand bonheur dans presque tous les médias : dessin, peinture, sculpture, décoration et films.

Aujourd'hui j'ai choisi de présenter des extraits d'un travail en cours.

Depuis quelques années je travaille sur un film d'animation dont je suis la créatrice. Il commence en noir et blanc pour finir en couleurs.

Dans une nature enchantée, c'est l'alliance de deux créatures hybrides mythiques, la Sirène et le Garuda, pour résoudre le problème de l'eau.

Mes compétences s'arrêtant à la création, je suis à la recherche d'un producteur...



Vous pouvez voir le reste de mon travail sur mon site :

[www.chantalbeaumont.com](http://www.chantalbeaumont.com)

Amitiés espérantistes



## Bertucceci Marie-Hélène (Espéranto-Marseille)

Graphiste de métier, et passionnée de photos, les composantes émotionnelles des couleurs m'interpellent. De la prise de vue à la réinterprétation personnelle, mon travail se situe pour l'essentiel dans la puissance intrinsèque des couleurs et leur interaction dynamique... une vibration colorée qui n'engage pas seulement le regard : c'est l'émotionnel qui voit avec les yeux. Rien n'est ajouté ou enlevé sur les clichés, aucun montage, tout est vrai même si rien n'est réaliste. Une incursion de l'imaginaire au sein de la réalité pour rêver ma vie en couleurs.



[www.mhbertucceci.com](http://www.mhbertucceci.com)

## Jean-Pierre Cavelan, alinome Yanpetro Kavlan (Nice)

Le but de ma quête picturale se résume ainsi:

- **S'exprimer est bien.**
- **Communiquer est mieux.**
- **Libérer sa propre imagination est un luxe extrême.**

Je me sens peintre parce que depuis toujours la création d'une image me procure des émotions indispensables à mon équilibre psychique, ceci posé, j'ai bien conscience que **se déclarer artiste-peintre n'est qu'une revendication que seul le spectateur peut légitimement valider.**

Mes images peuvent vous laisser indifférent ou même vous déplaire.



"Pour un monde meilleur, pour plus de fraternité et d'échanges, j'apprends l'espéranto depuis bientôt deux ans. Pour moi, l'échange universel que permet l'espéranto est une ouverture sur le monde extérieur, comme la couleur l'est sur mon monde intérieur."



J'accepte d'autant mieux cette situation que si certains peintres, même inconnus, me transportent, d'autres très célèbres, me laissent indifférent.

Il n'y a pas plus de honte à rester insensible, qu'à s'émouvoir. Le jugement de la valeur d'une œuvre d'art est purement subjectif.

Définir l'art de peindre n'est pas facile, par contre je pense distinguer ce qu'il ne doit pas être.

**La peinture ne doit pas jouer le rôle d'une nouvelle religion, qui complice d'une avide spéculation et de buts mercantiles, corrompt et mystifie un public naïf.**



memporetro



kantistino

Pour en savoir plus sur moi et mes œuvres, il suffit d'entrer librement dans mon site web qui est tout à la fois lieu de rencontres et d'échanges, blog, atelier d'artiste, galerie de peinture et boutique en ligne. Trouver le site est très facile, en notant le nom de domaine [yanpetro.kavlan.fr](http://yanpetro.kavlan.fr) Dans le site toutes les pages sont accessibles en deux clics par le bouton situé à droite. Les deux langues utilisées sont le **français** et l'**espéranto**.



Lin vi konas, ĉu ne?

Peindre libère l'imagination, par là même, le dialogue avec soi-même et avec les autres en est facilité.

Véhicule de l'imagination, pas plus qu'un autre art, la peinture ne permet d'explicitier des idées. "Ceci n'est pas une langue" aurait pu écrire René Magritte.

Pour réellement communiquer, en échangeant des informations et des idées, une langue est nécessaire.

Pour communiquer avec son voisin une langue locale est non seulement utile, mais elle est digne d'être aimée par ceux qui ont la chance de la parler mais on aime d'autant mieux le lieu où l'on vit, qu'on ne s'y sent pas enfermé, cet amour de la liberté m'a conduit à apprendre et à pratiquer **la langue internationale Internacia Lingvo ou Espéranto**.

J'ai rencontré aussi une manière de regarder le monde qui, à l'inverse d'une idéologie, libère l'esprit c'est la zététique qui se trouve à la base de la méthodologie scientifique. Voici pourquoi, dans mon esprit, **PEINTURE, ESPÉRANTO et RÉFLEXION CRITIQUE** sont indispensables à ma liberté imaginative.



massage (fr-eo)



zebroj

*n.d.l.r. : Venos aliaj prezentoj de artistoj kaj ties verkoj en la sekva(j) numero(j) de nia gazeto. Komprenoble, estas facile por mi aperigi tekstojn kaj bildojn. Pli malfacilas prezenti sondokumentojn, sed tion mi povus fari per retligiloj. Do, se estas inter vi muzikistoj, kanzonistoj, kantistoj, ĥorestroj, deklamistoj... kaj se eblas ie sur la reto spekti pecojn de via laboro, ankaŭ vi estas bonvenaj ĉi tie.*

## Paĝo de la komencantoj

### Pri horoj...

Ekde la 28a de marto, ni vivas je somera horaro.

Somera tempo estas ŝanĝo de la oficiala tempo per aldono de unu horo, tiel delokigante la lumtagajn horojn dum iu periodo de la jaro. La reŝanĝo (redono) de la horoj okazos la 31an de oktobro. [...]

La ĉefa celo de la somera tempoŝanĝo estas redukti la uzon de energio, tamen multaj esploradoj pruvis, ke tio estas nur tre minimuma.

En 2007, la Eŭropa Komisiono agnoskis, ke la energiŝparado per horŝanĝo estas eta, kaj plietigis dum la venontaj jaroj, pro la ĝeneraligado de energiŝparlampoj. [...]

Raporto de la Franca Senato en 1997 konkludis, ke la avantaĝoj anoncitaj kaj atenditaj ne estas sufiĉe gravaj por kompensi la malavantaĝojn pri: publika sano, laborkondiĉoj kaj vivstiloj, agrokulturo, media protektado, veturilsekureco, turismaj industrioj, libertempoj kaj eĉ pri energiŝparado (pro plifortigo de hejmhejto matene dum aprilo kaj oktobro). Ĝi proponis, ke Francujo adoptu senŝanĝe sian vintran tempon.

(fonto: Vikipedio)

### Kioma horo estas nun?

- 4 h > Estas la kvara.
- 15 h > Estas la dek-kvina
- 12 h > tagmezo
- 24 h > noktomezo
- 12 h 10 > tagmezo kaj dek minutoj; la dek-dua kaj dek minutoj; dek minutoj **post** la dek-dua
- 2 h 1/2 > la dua kaj duono; la dua kaj tridek minutoj; la dua tridek
- 17 h 15 > la dek-sepa kaj kvarono; la dek-sepa (kaj) dek kvin (minutoj), kvarono **post** la dek-sepa
- 3 h 40 > la tria kaj kvardek minutoj; dudek minutoj **antaŭ** la kvara
- 16 h 45 > la dek-sesa (kaj) kvardek kvin (minutoj); la dek-sesa kaj tri kvaronoj; kvarono **antaŭ** la dek-sepa



**Plurelekta demandaro**  
laŭ verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de *Espéranto-Info*

#### 1 - gramatika

- a) Li diras ..... li venos morgaŭ.  
1 - kiam ; 2 - kio ; 3 - ke
- b) Tuj ..... tagiĝos, ni foriros.  
1 - kiam ; 2 - kio ; 3 - ke
- c) ..... okazas? Ĉu vi estas malsana?  
1 - kiam ; 2 - kio ; 3 - ke

#### 2 - vorto-trezora

- ĉ) elektu "bilanco", "naso" aŭ "pesilo" por traduki la francan "balance"  
1 - pour peser : .....  
2 - à écrivisse : .....  
3 - en comptabilité : .....
- d) elektu "banderolo", "bando" aŭ "bendo" por traduki la francan "bande"  
1 - de journal : .....  
2 - de papier, de toile : .....  
3 - de voleurs : .....



**Superzam'**  
proponita de  
Jean-François Cousineau

1. En kioma jaro okazis la 1a Azia Universala Kongreso?  
a- 1917 b- 1932 c- 1965
2. Kiu verkis la novelaron "La teatra korbo" en 1924?  
a- Schwartz b- Baghy c- Kalocsay
3. Kiu disko de Kajto aperis kadre de Kolekto 2000 de Vinilkosmo?  
a- Masko b- Lokomotivo, rulu nun c- Tohuvabohuo
4. En kiu urbo naskiĝis Zamenhof?  
a- Varsovio b- Vilno c- Bjalistoko
5. Kiu korelativa ekaĵo signas kolektivecon?  
a- t b- ĉ c- k
6. Kiu estas la plej ampleksa lando en Afriko?  
a- Alĝerio b- Kongo DR c- Sudano

#### Plurelekta demandaro

##### 1 - gramatika

a: 1 ; b: 2 ; c: 1

##### 2 - vorto-trezora

ĉ1: averto ; ĉ2: invito ; ĉ3: admono

d1: aperturo ; d2: bero ; d3: golfeto

#### Solvaj de la demandoj en EP 122 aŭtuno 2020

#### Superzam'

1 c > neniam

2 c > Baghy ; 3 b > Nederlando

4 c > komercisto ; 5 a > i

6 c > Nov-Gineo

## ZEO-oj en Regiono "SUD / PACA"

### Pascal Vilain

Post Hyères en la numero 122, kaj laŭ la alfabeto ordo, mi intencis paroli pri Manosque (04).

Laŭ mia scio, ĉi tiu urbo havas du Zamenhof-Esperanto-objektojn, t.e. straton Louis Lazare Zamenhof kaj bushaltejon Zamenhof. Sed miaj petoj al esperantistoj el Manosque restis vanaj, ĝis nun.

Vi eble vidos fotojn kaj klarigojn pri la ZEO-oj de Manosque en la somera numero.

Se ne... sekvos la ZEO-oj de Marseille kaj poste Martigues.



### À noter sur votre agenda

Dans les n<sup>os</sup> 121, 122 et 123, il était écrit ici-même que la crise sanitaire était toujours d'actualité et qu'il ne fallait pas écarter la possibilité d'une nouvelle vague d'attaque virale accompagnée d'une nouvelle période de confinement. Eh bien rien n'a changé, nous en sommes toujours là, et les dates indiquées ci-dessous ne le sont toujours qu'à titre indicatif.

#### dans notre fédération

les **1<sup>er</sup>** et **3<sup>ème</sup>** jeudis de chaque mois, jusqu'à ré-ouverture des bars: réunion par Zoom proposée par Espéranto-Marseille

infos : <http://esperanto.marseille.over-blog.com>

*(quand les cafés seront ouverts)*

**1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille**

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes

4 square Stalingrad, 13001 Marseille

**dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères**

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare

45 rue Edith Cavell (face à la gare)

#### en France

pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs pour savoir si la programmation est maintenue.

#### Baugé (49) - Château de Grésillon

avril 16-24 : 10<sup>ème</sup> PRINTEMPaS

avril 26/mai 2 : LandArt et chorale Interkant

juillet 3-9 : 1er festival Naturist' + Semaine Verte de Naturisme (FFN + INOE)

<http://gresillon.org/?lang=fr>

#### Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

mai 8-10 : en ligne > 72<sup>ème</sup> congrès de SAT-Amikaro

<https://www.sat-amikaro.org/congres-2021-en-ligne>

mai 15 : en ligne > Assemblée générale d'Espéranto-France

<https://esperanto-france.org/assemblee-generale-2021>

#### en Europe

juillet 17-24 - Belfast (Irlande du Nord) :

106e congrès international d'UEA (*à confirmer*)

<https://uea.org/kongresoj>

juillet 25/1 août - Białystok (Pologne) - 94e Congrès de SAT (Le congrès des 100 ans !) (*à confirmer*)

<https://sat.bialystok.pl/programo-2021/>

*n.d.l.r.: Monique Prezioso sendis tekston verkitan de Saliko, el Finnlando, kutima partoprenantino en MES, kiu permesis ĝian publikigon en nia gazeto. Ĉar temas pri la Mediteranea Esperanto-Semajno kaj la unuaj pandemiaj tagoj, mi opinias, ke ĝi meritas lokon ĉi tie. La teksto troveblas ankaŭ ĉe:*

<http://verkoj.com/verkistoj/raita-pyhala/el-la-taglibro-de-paŭla/>

## Raita Pyhälä (Saliko)

### El la taglibro de Paŭla

Okazantaĵoj flosas kaj ŝanĝiĝas en la rivero de la tempo, drivas for. Mi, la notanto, notas kelkajn el la vivo de Paŭla dum la korona jaro.

Paŭla vekigis frue kiel kutime, eĉ tro frue. La malhelo de vintraj matenoj tudas, ĝis la naŭa aŭ deka horoj. Longe daŭras antaŭ ol la suno eklumigas la arbo-pintojn. Ŝi scias, ke ne longe estos lume, ofte venas nuboj, la suno neniam grimpas pli alten, ombroj longas. Malgraŭ tio Paŭla sentas sin kontenta, preskaŭ feliĉa. La radio dissendas klasikan muzikon ĝis la novaĵelsendo. En ŝiajn orelojn tenere penetras *La Valse triste* de Jean Sibelius. Ho, ŝi tute ne tristas, la Silvestro kaj Julo pasis en bona etoso ĉe la gefiloj kaj genepoj, ĉio en la tradicia maniero. Ŝi ricevis kiel donacon malgrandan ruĝan radion por sia noktotablo. Iom ŝin nun maltrankviligas tio, ke eble la laŭta muziko ĝenas la najbarojn malantaŭ la muro, ŝia aŭdo ja malboniĝis, ofte ŝi devas plilaŭtigi la sonon. Interrompas tamen ŝiajn pensojn mallonga mencio en la novaĵoj: en iu laponia skicentro iu nekonata malsano kaptis ĉinon: ŝi kaj ŝiaj du infanoj estas enkvarantigitaj. Tiun sciigon Paŭla tamen rapide forgesas, pli interesas ŝin la veterprognozo: pluvo en la sudo, neniu neĝo tie, kvankam ĉiuj atendas la blankan kovrilon, kiu iom heligus la grizajn tagojn januarajn. La interrompita ĉeno de ŝiaj pensoj religiĝas al la duboj pri la normala laŭteco de la elsendo. Ĉu ŝi hodiaŭ iru al la pordo de la najbarino por demandi, ĉu la matenmuziko ĝenas ilin? Oni ja neniam scias, kio ĝenas kiun kaj pri kio homoj plendos. Sekvatage, demandinte la najbarinon, Paŭla ekscias, ke la muziko vere ĝenas ŝian familion en la semajnfinaj frumatenoj, kiam ili ŝatus dormi pli longe. Paŭla bedaŭras, pardonpetas kaj decidas havigi al si aŭskultilon, kies sonon nur ŝi mem aŭdos.

En Les Issambres ĉe la Lazura bordo de la Mediteraneo dum februaro-marto en dek kvar jaroj okazis MES, Mediteranea Esperanto-Semajno. Paŭla aliĝis jam dufoje. La tiea printempa medio, la internaciaj partoprenantoj, la varia programo kaj precipe la nekredible bonaj manĝoj de la kasteleca ferio centro logas ŝin. Ŝi provas konvinki sian svedan amikino Karina

kunvojaĝi. Kvar okuloj ja vidas pli ol du, ili povos helpi unu al la alia sur la vojo, sed Karina hezitas, ankaŭ ŝi aŭdis ion pri nova nekonata malsano, kiu aperis en Ĉinio kaj minacas almenaŭ Eŭropon. Paŭla anstataŭe parolas pri la blua maro, la sunbrilo, palmoj, verdaj parkoj, buntaj floroj, varmo kaj la frandaĵoj de la restoracioj. Ŝi diras al Karina, ke ŝi sola aliĝos eĉ se Karina ne. Paŭla ne volas pasigi semajnon en vintra Stokholmo kun Karina sed en printempa suda Francio. Ili diskutas kaj disputas en siaj telefonvokoj ĝis Karina decidiĝas. Ankaŭ ŝi flugos malgraŭ siaj maltrankvilo kaj duboj.



En la flughaveno de Stokholmo vidiĝas amaso da homoj serĉantaj siajn giĉetojn, tirantaj siajn bagaĝojn, kafumantaj kaj manĝetantaj en restoracioj. La *tax-free*-vendejoj altrudas siajn nekalkuleblajn logaĵojn. Ie kaj tie paŝas pasaĝero kun vizaĝo duonkovrita per masko. Ĉu oni timas la novan malsanon? Ĉu tia masko vere ŝirmas? Karina kaj Paŭla interparolas pri tio dum la flugo. Karina kredas, ke la malsano timigas kaj oni ja devus ŝirmi sin. Paŭla iom ŝercas, trovas la maskitojn amuzaj kaj kompatindaj, ŝi nek agnoskas la danĝeron nek vere kredas, ke la maskoj utilos. Jam la aviadilo flugas super la Alpoj. Spirhaltiga montara pejzaĝo disetendiĝas sub la alta sennuba ĉielo. Neĝkovritaj akraj pintoj kaj timige krutaj deklivoj blanke brilas sub la suno. En la ombraj abismoj oni vidas nur malhelon, nokton. Kelkloke malfermiĝas valetoj, aperas vilaĝetoj, bienetoj, preĝejo. Paŭla pensas pri homoj de la pasinteco, soldatoj kaj fuĝantoj grim pantaj kaj pereantaj, perditaj. Ŝi pensas pri la deziroj de la kredantoj, pri la preĝejoj, kiuj konstruiĝis el la granda bezono, fido kaj espero de la montaranoj. Ili klare komprenis, ke ili pluvivas nur de la graco de Dio en naturo, kiu multon donas kaj multon postulas. Nun la aviadilo jam post-lasas la Alpojn, superflugas la vesperan Mediteraneon, malaltiĝas por surteriĝi en Nico. Ĉiun ondeton de la blua marvastaĵo kronas ora lumkresteto. La vespera lumo efikas kiel sorĉo.

Por norduloj la printempo en Nico ŝajnas nekredebla miraklo. Paŭla apenaŭ fidas siajn okulojn kaj nazon, sian haŭton, kiu jam sciigas, ke estas varme kaj iel ĉarme somerece. Tio, kion Paŭla kaj Karina imagis kaj esperis en siaj arktaĵoj, nun fariĝas flarebla, tuŝebla, atentokapta. Ili havas nek vortojn nek tempon priskribi siajn travivaĵojn, siajn sentojn. Ili nur ĝuas. La gastigantoj akceptas la du gastinojn per afablaj vortoj, elkoraj ridetoj. Manĝotablo atendas. Tamen la gastigantoj ne manpremas, ne brakumas, ne paroli pri kisetoj. Iom modeste kaj ŝerce ili klarigas, ke nuntempe en suda Francio oni salutas unuj la aliajn per ŝuopinta tuŝeto aŭ per kubutoj. "Vi certe aŭdis pri la korona viruso, aŭ ĉu vi nomas ĝin kronviruso?... Bonan apetiton!" Post la manĝo, vinoj, fromaĝoj, bakitaj pomoj, kuko kaj kafo oni sentas sin sekura, laca sed scivolema pri la artaĵoj en la hejmo de la gastigantoj. Kunplezure ili rakontas, kie en Afriko la statuoj kaj ornamaĵoj estis aĉetitaj aŭ ricevitaj. Ĉiu objekto havas sian interesan historion.

Sekvatage la gastigantoj ofertas aŭtan vidaĵoturneon en Nico. Kio povus esti pli bona? Nenio! La aŭto preteriras la varian arkitekturon de la Promenejo de la Angloj. La gastoj tra la fenestroj de la aŭto vidas pli ol ili povas atenti: homoj promenas kun grandaj bukedoj da sunflavaj mimozoj surbrake, iuj vestitaj en peltaĵoj kaj botoj, aliaj pli leĝere, printempece. Kiom da belaj virinoj! Sur la strando iu pretigas sin por matena sinbanado, alia sekigas sian tremantan korp-on per granda bantuko. Ambaŭ turnas la dorson al la urbo, ili dediĉas sin nur al la maro. La turistoj surpriz-iĝas pro statuoj tre modernaj: mentono sub peza etaĝdomo, kisopretaj ruĝaj lipoj, seĝo ŝanceliĝanta en aero... sed kvankam la trafiko ne ankoraŭ multas, oni ne povas haltigi la aŭton por foti ĉion fotindan.



Kia domaĝo, ke ne en Nico la novgastinoj restos, ĉar ilin atendas la MES multe pli okcidente, kaj ankaŭ ili ĝojatendas la MESon.

Survoje tien nur pliiĝas kaj pliiĝas la sorĉe somereca etoso.

Ne nur mimozoj, sed violoj, tulipoj, primoloj, iridoj, belisoj, lekantetoj, krizantemoj, sovaĝaj ĉiamverdaj mediteraneaj pinoj kun surprize grandaj strobilegoj, aliaj arboj nekonataj, kaj ĉiam la maro maldekstre, pli malpli proksima, rokoj, rokegoj, plaĝoj, plaĝetoj, sed ankaŭ altaj bariloj kun pikdrato supre, firmaj pordegoj kun seruregoj kaj elektraj kodaroj. Homoj kiuj posedas tro multe evidente ekskludas aliajn kiuj havas tro malmulte.



Karina kaj Paŭla kun siaj veturigantoj alvenas en la Feriokastela parkejo je la tagmanĝa horo. Elaŭtiĝas tie aliaj vojaĝintoj, ridetas, salutas per mansvingo aŭ la jam konata ŝuopinta tuŝeto. La per kredo manskribita menuo ĉe la enirejo de la restoracio ŝajnas enigma al nefranco. La literoj diferencas de tiuj en la Nordio, ne paroli pri la nomoj de la pladoj. Baldaŭ la alvenintoj vidas, ke la manĝaĵoj estas bele metitaj sur bufedaj tablegoj, oni elektu laŭplaĉe: legomojn, salatojn, fruktojn, fromaĝojn, jogurtojn, desertojn, tortojn, kukojn, fiŝaĵojn tie kaj viandaĵojn tie ĉi. Paŭla demandas Karin-an, ĉu ŝi vidas glaciaĵojn. Jes, ŝi trovas, jen la glaciaĵoj. Jen boteloj da vino surbrete, prenu kiun vi volas. Tra fenestregoj videblas verdaj palmoj, akvo kiu lirle fluas de la Kastelo al ŝprucanta fontano ĉe la fino. Ĝardenisto kaŭras ĉe la florbedo, sarkas, tondas, plantas, akvumas. Pli fore la maro, ĉiam la maro. Dum ventegoj oni aŭdas ĝin.

Komenciĝas la lecionoj. La plej supran nivelon arigas ĉirkaŭ si rusa intruisto Mikaelo Bronŝtejn. Li subtenas la atenton de la grupanoj per gitaro kaj kantoj, anekdotoj, ampleksaj scioj pri gramatikaĵoj, vortaro, la historio de Esperanto kaj esperantistoj en Rusio. Tamen la studentoj plilongigas la paŭzojn, ili ja renkontas konatojn kaj geamikojn de longe neviditajn kaj nun studentajn en aliaj grupoj. Starante inter la densa babilantaro oni facile forgesas la horaron. Oni aŭdas krokodiladon, ridojn. Iu virino kritikas, ke S-ro Bronŝtejn uzas anekdotojn elpensitajn de viroj pri virinoj, kontraŭ edzinoj, bopatrinoj, fraŭlinoj, amitinoj. Sed tiajn ŝercojn kaj anekdotojn oni ja plej ofte rakontas.

Ĉu la kialo estas, ke la virinoj mem ne havas tempon elpensi anekdotojn pri viroj? Inoj ja havas multe da laboro kiel dommastrinoj, patrinoj, edzinoj, helpantinoj? Laŭ Paŭla ankaŭ kelkaj el la kantetoj uzataj dum la supera kurso ofendas virinon, kiu esperas interseksan egalecon.

Dum la longa posttagmeza paŭzo la kursanoj profitas de la bela marbordo, se ne pluvas. Ili promenas laŭ la ĉestranda strato en grupoj, en paroj, solaj. Unu tagon Karina kaj Paŭla haltas antaŭ monumento dediĉita al la elŝipiĝo de la 45a divizio usona. La alveno de tiu liberiga soldataro okazis je la sesa horo tridek en la 15a de aŭgusto 1944. Nun samloke du ne malgrandaj knaboj konstruas sablokastelon, feliĉaj pro la suno kaj varmo, memkonfidaj kaj vigle kunlaboremaj. Alitage Karina rimarkas ekspozicion pri la piloto kaj verkisto Saint-Exupery en la surstranda muzeeto. Preskaŭ ĉiutage la du promenantinoj trovas benkon en kvieta loko por sidiĝi kaj aŭskulti, observi la ondojn. En tagoj kiam la vento ege fortas ili observas la surfantojn. Vespere okazas ankoraŭ unu leciono por ĉiu grupo, post tio la komuna vespermanĝo, filmoj, koncertoj, prelegoj ilustritaj de fotoj en granda salono. Post koncertoj oni povas ankaŭ danci. La ĝentilaj viraj partoprenantoj dancigas ĉiujn.

Dum la paŭzoj kaj manĝoj la kursanoj pli kaj pli parolas pri la korona viruso. Ili komparas siajn sciojn. La organizantoj de la MES dissendas al iliaj retpoŝtaj adresoj informojn venintajn el Italio, kie la situacio malboniĝas. La informoj trankviligas la ricevantojn, ĉar la itala kuracisto donas sekvindajn konsilojn kaj asertas, ke la viruso mortos, kiam la temperaturo plialtiĝos super 24 gradoj. Post du tagoj tamen venas kontraŭaj informoj kaj konsiloj, nenio ŝajnas firma kaj fidinda. Sento de nesekureco kreskas. Ĉe la enirejo de la granda manĝejo aperas boteloj da desinfektaĵo. Ne ĉiuj klientoj uzas tion, sed la kelnerinoj dankas tiujn kiuj uzas. Oni aŭdas, ke ne ĉiuj kiuj aliĝis al MES kuraĝis veni pro timo de infektoj. Tamen oni grupfotiĝas gaje babilante. Ĉiuj volas montri sin plej eble sanaj kaj belaj. En la antaŭa vico nepre staru la amindaj gejunuloj, kiujn rusa instruistino venigis el Siberio. Dum MES ili turnas ĉies kapon: juneco, ridemo, sano, ekzotiko.



**ĜIS REVIDO!★**



## La laguno de Reunio

En la okcidenta parto de Reunio estas longa bendo de koralo. La internan parton, inter la plaĝo kaj la alta maro, malprofundan kaj trankvilan ĉar ŝirmita kontraŭ la ondoj, oni nomas laguno.

Ni ofte iras tien por naĝi aŭ pikniki sur la plaĝo. Tiun plaĝon borderas altaj arboj: multaj homoj iras pikniki tien en la ombro ĉiun semajnfino. Tamen pro la nuna viruso la leĝo malpermesas tiujn kunvenojn.

Kiam ni naĝas en la laguno, kun masko kaj spirtubo, ni vidas alian mondon. Jen kelkaj fiŝoj, kiujn ni renkontas.



En la centro, la flava fiŝo kun nigraj strekoj nomiĝas La idolo de la Maŭroj. Kial? La malgrandaj blujaj fiŝoj nomiĝas Fraŭlinoj.

Kelkaj homoj kredas, ke tiu fiŝo nomiĝas Ivo, ĉar ĝi havas la rideton, kiun ekhavis Lapenna tuj post kiam li eksciis la sukceson de la Uneska konferenco en Montevideo.

Aliaj nomas lin La Markizo, ĉar lia maliceta rideto elvokas la bonan trompŝercon de la Delegitaro en 1907.







Tian fiŝon oni nomas kofro-fiŝo. Ekzistas pluraj specioj de tiaj puŝitaj fiŝoj..



Papiliofiŝo.



Fluto

Tiu fiŝo nomiĝas Pikaso. Ĝi mordas, kiam oni tro proksime venas.



Mempotreto de la fotistoj en la laguno.

Maggy kaj Filip

*Jen raporto pri la 10a datreveno de la Fukuŝima katastrofo, sendita de HORI Jasuo. Sekvas ĝin mesaĝoj, kiujn li ricevis, i.a de la klasanoj de Marie-Ho, (Freinet-instruistino el Ceyreste), kaj de Renée Triolle.*

## La dek-jara datreveno de la katastrofo en 2011

Dek jaroj pasis de la Granda Katastrofo en 2011. Kalkulante, kiom da fojoj mi vizitis la katastrofajn urbojn kaj vilaĝojn, mi sciis, ke mi vizitis ilin 64 fojojn. De la gubernioj Aomori ĝis Ibaraki, mi vizitis multajn lokojn trafitaĵojn de la tertremo, la cunamo kaj la nuklea akcidento.

Estas tri kialoj, kial mi iris tiel ofte. Unu estas, ke kiel aŭtoro de « Raportoj el Japanio », raportoj en Esperanto pri Japanio, mi volis dissendi informojn pri tiu katastrofo al la mondo, precipe tiujn informojn pri la nuklea akcidento, ĉar ĝi estas historia okazintaĵo, el kiu oni devas nepre lerni lecionon, do mi volis informi la mondon pri la nuna situacio en Fukuŝima kaj kontribui al la kontraŭnuklea movado.

Due, mi okupiĝis pri subtenado de infanoj en Tooni en la gubernio Iŭate de naŭ jaroj. Por la subtena movado, mi vizitis Tooni-on trifoje jare (diplomiĝa ceremonio, sporta festivalo, kultura festivalo), kaj profitante la okazojn, mi vizitis la ĉirkaŭan regionon. Trie, la nombro de interŝanĝoj kun lokaj homoj iom post iom pliiĝis, kaj mi volis renkonti ilin.

Estas sennombraj pejzaĝoj en mia memoro pri tiuj urboj kaj vilaĝoj, kaj estas malfacile desegni ilin sur unu, du paperfolio, sed mi kuraĝis provi.

La mapo montras la nordorientan parton de Japanio. Pli norde estas la insulo Hokajdo kaj sube estas Tokio. La cunamo atakis la marbordon de Hokajdo al Tokio. Multaj urboj kaj vilaĝoj situas laŭ la marbordo, tial ili estis rekte atakitaj de la cunamo kaj detruigis. La nukleaj centraloj de Fukuŝima troviĝas meze iom malsupre. La damaĝoj de la katastrofo estis tre grandaj. Vidu sube:

### Damaĝoj en la katastrofo

	Entute	Iŭate	Mijagi	Fukuŝima	Aliaj
<b>Mortoj</b>	<b>15899</b>	<b>4675</b>	<b>9543</b>	<b>1614</b>	<b>67</b>
<b>Malaperoj</b>	<b>2526</b>	<b>1111</b>	<b>1215</b>	<b>196</b>	<b>4</b>
<b>Rilataj mortoj</b>	<b>3775</b>	<b>470</b>	<b>929</b>	<b>2320</b>	<b>56</b>
<b>Entute</b>	<b>22200</b>	<b>6256</b>	<b>11687</b>	<b>4130</b>	<b>127</b>

<b>Rifuĝintoj (2021)</b>	<b>41241</b>
<b>en 2011</b>	<b>470000</b>
<b>Detruitaj domoj</b>	<b>405117</b>

Ja estas multaj viktimoj, sed ankaŭ multaj estas malaperintoj. La cunamaj ondoj ripete venis kaj revenis, tial multaj homoj estis enfluitaj en la maron kaj malaperis.

Rilataj mortoj estas tiuj mortoj kaŭzitaj ne rekte de la tertremo kaj cunamo, sed de postefikoj, ekzemple malbona flegado, malbonaj vivkondiĉoj, sinmortigo pro malespero. En Fukuŝima, multaj rifuĝintoj suferas pro depresio, loĝante en fremdaj lokoj kaj perdinte esperon. Tial ankoraŭ nun iuj mortoj estas kalkulitaj kiel tiaj mortoj.

La nombro de rifuĝintoj en 2011 estis 470000, kaj ili loĝis en provizoraj dometoj. Nun plejmultaj homoj translokiĝis al novaj domoj aŭ luitaj domoj, sed ankoraŭ troviĝas homoj, kiuj loĝas en tiuj provizoraj domoj.

Multaj rifuĝintoj en Iŭate kaj Mijaĝi povis reveni al sia eksa loko, post kiam la inunditaj lokoj estis talusitaj kaj novaj urboj estis konstruitaj, sed multaj rifuĝintoj el Fukuŝima ne povas reveni hejmen, ĉar iliaj urboj kaj vilaĝoj estas ankoraŭ ne loĝeblaj pro forta radioaktiveco, aŭ ili ne volas reveni, ĉar ili timas la influon de la radioaktiveco kaj mankas tie vivkondiĉaro. Precipe patrinoj kun infanoj, kiuj fuĝis al foraj gubernioj, timante radioaktivecon al siaj infanoj, ankoraŭ ne povas reveni al sia hejmloko kaj havas malfacilan vivon. Dum la komencaj kelkaj jaroj la registaro kaj la gubernio Fukuŝima disponigis al ili senpagan apartamenton, sed poste ili provas forpeli ilin el tiuj loĝejoj.

La kompensa mono ne estas sufiĉa por la rifuĝintoj pro la nuklea akcidento kaj TEPCO kaj la registaro ne aprobas sian respondecon pri la akcidento, tial multaj homoj metis la aferojn al la juĝo kaj bataladas. La fina fuĝado ĵus komenciĝis en la plej supera tribunalo.



#### Klarigoj pri la pejzaĵoj en la bildo:


Dekstre supre estas faligitaj kontraŭcunamaj digoj en la urbo Tooni en la gubernio Iŭate. Ili estis 12 metrojn altaj kaj ŝajne tre fortaj, sed la cunamo facile faligis ilin kaj la protektita kvartalo estis tute detruita. Mi vizitis

la urbeton en aŭgusto 2011. Ankoraŭ restis detruitaĵoj ĉirkaŭe. Mi staris apud la digoj kaj rimarkis, kiel grandaj kaj altaj ili estas.

Sube dekstre estis tinusa ŝipo portita de la cunamaj ondoj al la stacidomo Ŝišiori-Karakuŭa kelkajn kilometrojn enlanden. Ĝi estis tre granda ŝipo. Post du jaroj ĝi estis malkonstruita, kaj sur tiu tereno nun staras belaj apartamentaroj.

Sube maldekstre estas tigro eble farita el fero. Mi trovis ĝin en la urbo Oocuĉi sur la tereno de detruita domo. Ĝi jam rustis kaj vane muĝis al la ĉielo.

Plej sube estas montetoj da radioaktive poluita tero kovritaj per verdaj kovriloj en la vilaĝo litate. Ĝi situas enlande kaj fore de la nuklea centralo, sed malfeliĉe la nubo enhavanta radioaktivaĵon flugis sur ĝi, kaj ĝi fariĝis poluite neloĝebla loko. Ankoraŭ nun iuj lokoj en la vilaĝo estas neloĝeblaj kaj la eksaj loĝantoj ne povas reveni.



La centro estas la pejzaĝo de Rikuzen-Takata fine de aŭgusto 2011. Dekstre staris 7-etaĝa « Kapitola Hotelo 1000 », kiu estis inundita ĝis la 4a etaĝo kaj poste malkonstruita. En la mezo, sur la nacia vojo n-ro 6, nur la ŝildo de la benzinstacio restis, kaj la ŝildo estis gratita. Tio signifas, ke ĝi estis inundita ĝis ĉi tiu alteco. La supera mezlernejo Takata videblas maldekstre. La areo estis la centro de la urbo, sed ĉiuj krom la betonaj konstruaĵoj estis forlavitaj.

Malsupre dekstre estas ĝuste loko apud la stacio Minami-Kesenuma, kie estis urbocentro, sed ĉio malaperis, kaj la fervoja kajo kaj la 4-etaĝa konstruaĵo enhavinta manĝejoj kaj trinkejoj restis. Apud tio estis amaso da dispremitaj aŭtoj. Ĉiu estis ĉifita, kaj mi sentis min malĝoja, kiam mi pensis, ke iuj homoj certe mortis en ili.

Supre maldekstre kaj meze maldekstre estas Odaka en la urbo Minami-Sooma. Fukuŝima estis forte damaĝita de la tertremo, kaj ĉi tie en Odaka, plej multaj malnovaj lignaj konstruaĵoj disfalis aŭ la unua etaĝo disfalis. La vojo rekte al la stacidomo kurbiĝis. Odaka fariĝis evakuada areo, ĉar ĝi troviĝas ene de 20 kilometroj de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kiu kaŭzis la akcidenton, kaj ne eblis eniri dum kelka tempo.

Ŝajnas, ke eblis provizore eniri en la urbon unu jaron post la tertremo, kaj la instruistoj en Odaka Elementa Lernejo aranĝis la havaĵojn lasitajn en siaj klasĉambroj. Mi iris tien ĉirkaŭ duonan jaron poste. Ŝajnas, ke iuj lernantoj revenis kaj prenis siajn havaĵojn, sed la havaĵoj de pluraj homoj en ĉiu klasĉambro restis. Post tio, mi vizitis ĝin ĉiujare ĝis la lernejo fermiĝis, sed la ceteraj havaĵoj estis preskaŭ samaj, kaj fine ili estis stokitaj ie aŭ forĵetitaj, kiam la lernejo fermiĝis. La vortoj de la instruisto restis sur la nigra tabulo, kaj ankaŭ la vortoj de la revenantaj infanoj. Mi ne povis legi la mesaĝojn sen larmoj.

Sube centre estas la tombejo de la distrikto Ukedo en la urbo Namie. La fiŝhaveno Ukedo estis tiel detruita, ke nenij konstruaĵoj krom la elementa lernejo restis. En la tombejo, la tomboŝtonoj estis renversitaj kaj la urnoj estis malkovritaj. Ĝi estas senhoma pejzaĝo. Fore vi povas vidi la turojn de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Se ne okazus la nuklea akcidento, ĝi estus talusita same kiel la katastrofaj regionoj en Iŭate kaj Mijagi, kaj eblus vidi iom da rekonstruo, sed ĉi tie preskaŭ nenio estis farita en la lastaj 10 jaroj. Eble ĉi tiu tombejo ankoraŭ nun estas tie, same detruita.

Supre dekstre estas portempaj loĝejoj en la urbo Aizu-Ŭakamacu, kien translokiĝis rifuĝintoj el la urbo Okuma, kie staras la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Ĉar multaj eksaj loĝantoj de Okuma laboras en la nuklea centralo, duono de la loĝantaro estis en Aizu kaj duono en Iwaki proksima al la centralo. Pacifika marbordo de gubernio Fukuŝima estas varma loko, kie malofte neĝas, do kiel malfacile por ili vivi en tiel profunda neĝa Aizu kaj en malbone ekipitaj portempaj loĝejoj. Eble jam malkonstruitaj estas tiuj loĝejoj, sed Okuma ankoraŭ estas neloĝebla areo, do ili ne povas reveni al sia hejmurbo. Eble ili daŭrigas sian vagantan vivon, konstruante aŭ luante novan domon ie.

Oni ofte diras, ke je la 10-jariĝo de io oni devas forgesi la pasintecon aŭ komenci ion novan ktp. kaj kuraĝe antaŭenpaŝi. Fakte la damaĝitaj urboj estas bele rekonstruitaj, do de ekstere ordinaraj vojaĝantoj ne povas imagi, ke tie estis tiel granda katastrofo, tamen ne eblas forviŝi la traŭmaton kaj malĝojon el tiuj, kiuj perdis siajn familianojn kaj hejmojn. Viktimoj de Fukuŝima eĉ ne povas reveni al siaj hejmurboj.

La ŝtato, eĉ en la gubernio Fukuŝima, antaŭenpuŝas politikon neglekti aŭ forĵeti la suferantojn, kvazaŭ ĉio "jam finiĝus". Pri mia vojaĝo, la "vojaĝo por vidi la eksteron" preskaŭ finiĝis. Ekde nun, kiel ni paŝos kun la homoj trafitaj de la katastrofo, kaj ĉu ni povos fari tion? Ĉi-jare mi havas 80 jarojn, kaj mi devas pensi pli pri mi mem ol pensi pri aliaj homoj. Tamen mi firme decidis, ke mi daŭre subtenos la eksajn loĝantojn de Fukuŝima, nun loĝantaj en mia gubernio Gunma, kiuj batalas kontraŭ TEPCO kaj la ŝtato, kaj la grupon batalantan por infanoj elmetiĝintaj al radioaktivaĵo el la centralo.

la 12an de marto 2021. HORI Jasuo

## Gelernantoj de la klaso de Marie-Ho en Marsejlo, Francio

Alkroĉitaj estas bildoj de infanoj en Marsejlo, Francio. La instruistino de tiuj gelernantoj estas nomata Marie-Ho. Mi renkontiĝis kun ŝi, kiam mi prelegis en Francio en 2008, kaj post kiam okazis la Granda katastrofo kaj mi komencis subteni la gelernantojn en Tooni en la gubernio Iŭate, ŝi sendis al ili, pere de mi, artaĵojn el papero faritajn de siaj gelernantoj kun multaj fojoj.



Foto sendita la 11an de marto 2021

El tiuj artaĵoj, kio plej impresis min, tio estis la paperaj papilioj, kiujn oni metas sur la fingrojn. Kiam mi sendis ilin al Tooni, la lernejestro sendis al mi bildon de lernantoj, kiuj kuras en la gimnastikejo tenante la papiliojn. Kiam mi transsendis la foton al Francio, la infanoj tre impresiĝis, dirante: "Japanaj infanoj vere portas la papiliojn, kiujn ni faris!" Mi ankaŭ aldonos tiun foton.

La letero de Marie-Ho estas skribita per grandaj literoj sur granda papero, kaj ĉirkaŭ ĝi estas eltondaĵoj de papero faritaj de infanoj, kio estas tre amuza. Tiuj estas montritaj en la 2a etaĝo de la biblioteka konstruaĵo de la Jacugatake-Esperanto-Domo.

La subteno de Marie-Ho estis tre granda por la subteno de Tooni. Tiuj agadoj montras amikecon de esperantistoj kaj ilian varman koron el Homaranismo.



Konsiderante tion, mi eldonis la libron "La 9 Jaroj de Tooni" (en la japana kaj Esperanto) lastan jaron. Ĝi ankaŭ enhavas rakonton pri la papilio kaj bildon de la granda mano. Ĝi kostas 500 enojn.



Fotoj senditaj en 2014

La francaj gelernantoj tenas sian papilion ĉe la fingroj.

Foto de gelernantoj en Tooni, kiuj tenas la papiliojn ĉe siaj fingroj, en 2014.

**Foto de fama fotisto, kiun Marie-Ho sendis por la gelernantoj de Tooni. Ŝia granda letero.**



### Mesaĝoj el la mondo

#### Tertremo en Ĉeĥio

Saluton sinjoro Jasuo,

Mi aŭskultis novaĵelsendojn pri tertremo. Ĉio, kio okazas en mondo, havas influon al ni ĉiuj. Eĉ lokaj katastrofoj ŝanĝas veteron, akvofluon, temperaturon, kaj diversaj gasoj fuĝas al aero. Troa uzado de nafto kaj karbo ŝanĝas naturon, kaj tiuj ŝanĝoj povas sekvi katastrofojn.

Ankaŭ en Eŭropo estis tertremoj, kaj sufiĉe fortaj, kutime najbaraj landoj ĉiam helpis. Sendis fajro-brigadojn, monsubtenon, hundojn serĉantajn homojn sub ruinoj. Sed nun ĉiuj landoj estas fermitaj pro epidemia danĝero. Kaj kiam en Italio tertremoj detruis tutan urbon, ili devis helpi al si mem. Terura afero, kiam disfalas rilatoj, kiuj funkciis dum multaj jaroj. Ankaŭ en Ĉeĥio okazas tertremoj, sed preskaŭ ĉiam malfortaj, plejparte oni eĉ ne rimarkas ilin. Lasta tertremo sufiĉe malagraba estis pasintjare. Ofte bestoj reagis anxie, eĉ birdoj. Lastan jaron ofte estis fortaj ventegoj detruaj. Mi pensas, ke tio ankaŭ estas ŝanĝo en naturo. Olga.

Saluton sinjoro Jasuo, en iu filmo mi vidis ke sur stratoj restis sakoj kun poluita lomo. Kial? En Eŭropo ĉion oni kaŝas en jam ne funkciantaj minejoj. Por ĉiuj restaĵoj de nuklea industrio oni faras "ĉerkojn" el betono kaj ankaŭ kaŝas en jam ne funkciantaj minejoj. Se ĉiujn danĝerajn malpuraĵojn ĵeti al maro, fiŝoj kaj aliaj maraj bestoj, kaj kreskaĵoj en akvo poluiĝos kaj povas esti danĝeraj por homoj. Kion oni manĝos, se ĉion en ĉirkaŭaj akvoj estos malpurigita? Olga

#### Monneret, el Francio

Karaj geamikoj,

Franca radio parolas pri Fukuŝima; jes mi memoras kaj legis la multajn artikolojn senditajn de Jasuo. Mi kompatas vin dum tiu tago, kiu memoras viajn malfeliĉon. Plie mi legis en la ĵurnalo « HOMARARO », ke multaj malfacilaĵoj daŭre estas. Kaj la registaro ne helpas sufiĉe, eĉ volas trudi aliajn atomcentralojn, ESPERU, geamikoj, mi sendas ĉiujn AMIKAĴOJN.



Por gajigi vin, jen foto de KARNAVALO (2017 aŭ 2016)... sed tiun jaron, la festo ne okazis pro kronviruso.

### **Brazilo**

Saluton, kara Hori.

Mi memoras, domaĝe. Mi estas kun vi ĉiuj. Fortan brakumon. Amike, Edson

### **Latvio**

Hodiaŭ estas la 11-a de marto kaj en laŭ nialanda TV estis elsendoj okaze de terura akcidento antaŭ dek jaroj en Fukuŝima. Oni montris nuntempan urbeton Tomioka, kiu apudas Fukuŝima. Dankon pri la donacita libro kun viaj desegnaĵoj, fotoj kaj priskriboj. Antaŭ 31 jaroj najbara Litovia parlamenta deklaris pri restarigo de sendependa ŝtato. Ili ĉiujare festas tiun tagon. Aldis



### **Francio**

Kara amiko,

Per floroj de nia ĝardeno (kamelio kaj mimoza) niajn solidarajn pensojn en la 11a de marto, memortago de la katastrofo de Fukuŝima.

Se vi havas iomete da tempo, ĉu vi povas skribi artikolon pri la Katastrofo, post 10 jaroj. Eble foton aŭ desegnon ankaŭ? (entute 1 paĝo). Por nia normanda bulteno de aprilo, mi enpaĝigas (Yves estas la redaktoro)

Anticipe, mi dankas vin.

Amikajn salutojn. Michèle el Caen

### **Francio**

Kara,

Ĉi tie ankaŭ ni memoras pri la katastrofo de Fukuŝima. Televide ni povas vidi kiamaniere vi vivas tiun memoraĵon surloke de la katastrofo kaj alie en la lando. Ni vidis la gigantan muron konstruita por protekti.

Ni ĉiuj esperas, ke tio neniam denove okazos.

Amike, Maryvonne

### **Japanio**

Ĉu vi iris 64 fojojn? Dankon pro via helpo. La freŝa speciala programo NHK igis min konstati, ke ekzistas multaj homoj, kiuj ne resanigis siajn emociajn vundojn eĉ post 10 jaroj. Imagu la pensojn de paro, kiu perdis tri junajn infanojn, kaj mi ne povas trovi konsolajn vortojn. Viro de brutobieno, kiu mortigis multajn bovinojn, ankaŭ vivas kun grandaj vundoj. Bonvolu konscii pri kiom malsaĝa estas provi eksciti la rekonstruajn olimpikojn. La patrino, kiu perdis sian solan filinon, kiu laboris ĉe la urbodomo de Minami-Sanriku, diris: « Se mi antaŭeniros, la memoroj de mia mortinta filino malaperos, do mi ne plu paŝas antaŭen ». Mi certe memoru tiujn vortojn.



Kiam mi pensas, ke ĉiuj pejzaĝoj bildigitaj en la bildo estas konservitaj en via kapo, mi ne povas ne admiri vin. Bonvolu plu fari vian eblon laŭ via aĝo. Kurahayashi.

### **Japanio**

Mi vidis la pentraĵon. Dankon. Mi ankaŭ klare memoras tiun tagon. Dum la paŭzo je la 3a horo en la oficejo, mia kolego demandis min, ĉu mia edzino fartas bone, do mi tuj ŝaltis la televidilon. Estis filmeto pri la cunamo en Natori-urbo glutanta la domojn. La domo de gepatroj de mia edzino estis en Ucnomija, do ĝi estis sekura. Post tio la nuklea akcidento okazis kaj tio fariĝis serioza problemo.

Mi povas kontribui nenion, sed mi ŝatus esti proksima al vi, esprimante mian opinion kontraŭ nuklea energio kaj esprimante tion al aliaj. Mi esperas, ke vi ankoraŭ energias kaj ludos aktivan rolon. Mi ankaŭ antaŭĝojas pri la pentraĵo.

### **Francio**

Pripensoj pri Fukuŝima.

Jam dek jaroj pasis post la katastrofo, pri kiu vi tiel bone regule raportis. Mi supozas, ke la kompatinduloj, kiuj suferis daŭre suferas kaj ne ĉiuj rekonstruis sian vivon ! Ne parolante pri la nukleaj rubaĵoj, pri kiuj ni daŭre ne scias kion fari. Granda bedaŭro estas mia, ke tiu katastrofo tute ne helpis la mondon reipensi la atomenergion...

TRIOLE Renée

### **Nepalo**

Estimata Hori,

La 11an de marto 2011 cunamo okazis en Japanio, ĉu ne? Ĉirkaŭ 20000 homoj mortis. Rememoru la cunamon.

Via, Pradip

